

# juna amiko


februaro 2019 • n-ro 1/2019 (158) ←




PROGRESIGA REVUO  
POR LEGEMULOJ  
INTER 10- KAJ  
100-JARAĜAJ

*Nia sano:* Pri dentoj.  
*Konversaciaj temoj:* Sporta tago.  
*LUDE:* Kiu promesojn faras, tiu ne avaras.  
*Interkultura Mondo:* Leteroj por orienta fabelo.  
*Ferii kaj lerni:* Intervjuo pri 55-aj Baltiaj  
Esperanto-Tagoj. *LASTE:* Verba krucenigmo.

# Klaŭdia




Ni devas skribi pri kelkaj metioj kaj iliaj gravecoj kiel hejmtasko.




Metioj estas multaj: hartondistoj, ŝuistoj, horloĝistoj...

leterpoŝtistoj, masonistoj.




...bakistoj, seruristoj,

kuiristino kiel mia patrino.




Ne povas manki: la plumbistoj, la kudristinoj, la tajloroj...




Kaj vi Peĉjo, ĉu vi ne konas iujn?

Kia demando?


Ni estas en komputila epoko.



Ekzistas pli seriozaj aferoj: la genetiko, la interreto, la spacveturado...



Kial mi devas pensi pri plumbistoj aŭ ...?



Peĉjo, tio gravas, sed nun pensu pri iu ĉarpentisto por via seĝo.



# Enhavo



**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK);

Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) ..... 4



**Konversaciaj temoj:** Sporta tago (Judit Felszeghy, HU) . 5



**LUME:** El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) ..... 10


**Scienco:** Ludwik Hirszfeld (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 12



**Nia sano:** Pri dentoj (Renée Triolle, FR) .... 13



**LUDE, la unika dua etaĝo:** Kiu promesojn faras, tiu ne avaras (Mónika Molnár, CH) ..... 14



**Recenzo:** Ĉu estas facile ŝanĝi siajn dietajn kutimojn? ("La vegetara leono"; Luiza Carol, IL) ..... 18



**Ideo:** Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) ..... 20



**Mensogo:** Ĉu Mireille Grosjean kapablas mensogi? (Renato Corsetti, IT) ..... 21



**Legu librojn – premioj – konkursoj:** Nova jaro kaj novaj decidoj. (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 22

Nova retejo de UEA: uea.facila ..... 27



**Kantu kun Juna Amiko:** "Eta eta birdo" (Małgosia Komarnicka, PL/Vasil Kadifeli, TR) ..... 28



**Interkultura Mondo:** Leteroj por orienta fabelo... (Elena Nadikova, RU) ..... 30



**Ferii kaj lerni:** Intervjuo pri 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (Povilas Jegorovas, LT) ..... 35



**LASTE, la tria etaĝo:** Verba Krucenigmo. Terapio bezonata! (Stefan MacGill, NL/HU) ..... 37

KIE aboneblas *Juna Amiko*? Perantoj ..... 38

La 7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj ..... 39

**Eldonanto de Juna amiko:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe [ilei.mondo.info](http://ilei.mondo.info). Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ [lernu.net](http://lernu.net) kaj [edukado.net](http://edukado.net). **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Maier (Germanio) kaj Rob Moerbeek (Nederlando). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, [ilei.officejo@gmail.com](mailto:ilei.officejo@gmail.com). **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en majo 2019. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318



# Karaj amikoj!

**E**n la novan jaron kaj en la printempajn feriojn vi kun *Juna Amiko* povas elpaŝi pli sanaj: pro akvaj sportoj en la rubriko *Konversaciaj temoj*, pro sanigaj nutraĵoj en la rubriko *LUDE*, pro pli bona sango, danke al la sciencisto *Ludwik Hirszfeld*, kun pli sanaj dentoj, post tralego de la artikolo pri nia sano.

Vi povas konkursi kaj eĉ ŝanĝi kolorojn de viaj aŭtomobiloj, aŭ sorĉi kun sorĉistino en la rubriko *LUDE*, redukti viajn stresojn per legado de belaj libroj kaj legendoj, laŭ konsiloj en la rubriko *Legu kaj ĝuu...*

Eblas (eĉ fizike!) viziti du belegajn polajn urbojn, en kiuj en majo okazos *Interkultura Majrendevuo*, *Internacia Simpozio* kaj *Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj* – kun interesaj



prelegoj, ekskursoj kaj amuzajoj – kaj eĉ serĉi oron en la ĉefurbo de la pola oro, en mondfama orminejo (se vi ne timas fantomojn), sed ankaŭ danci, kanti kaj vespere rosti kolbasojn ĉe fajro.

Perfektigi en Esperanto vi povas danke al la nova retejo *uea.facila*, kanti kun *Juna Amiko* kaj kun eta turka birdo, admiri en la rubriko *Interkultura Mondo* la mirindan kaj fabelan urbon Samarkando en Uzbekio.

– Cetere, kion vi faros ĉi-somere? Ĉu eble indus viziti la jubileajn *Baltiajn Esperanto-Tagojn* en Litovio, kun 5-nivelaj Esperanto-kursoj, multaj ekskursoj, prelegoj, koncertoj kaj dancado?

Kun la nuna numero de *Juna Amiko* vi denove povos solvi krucenigmon kaj eviti dors-dolorojn en la rubriko *LASTE*.

Agrablan legadon, karaj junaj amikoj!  
Via redaktoro  
**Stano Marček**

# Karaj legantoj!

**E**en tiu ĉi numero Renée Triolle skribas pri dentoj. Pri tiuj blankaj juveloj en nia buŝo, utilaj al la digesto, ĉiu scias; ĉiu scias, ke bebo ne ankoraŭ havas dentojn, ke ĉe bebo ili iom post iom aperas en la aĝo de ses monatoj, ke bebo ne povas maĉi nuksojn, ĉar mankas la grandaj dentoj, la mueldentoj por maĉi malmolajn nutraĵojn. Ĉiu scias, ke tiuj unuaj dentoj iom post iom falas, kiam la kreskantaj definitivaj dentoj




formanĝas la radikojn de la laktodentoj. (Pli vi scios legante <https://eo.wikipedia.org/wiki/Dento>.)

Tiaj fenomenoj pri dentoj okazas tute same ĉe infano en Tanzanio, en Indonezio aŭ en Argentino. La aparteno al iu etno ne ludas rolon. Tio estas universalajo.

En nia revuo *Juna Amiko* ofte ni prezentas al vi ion universalan, kaj ekkono de tiaj fenomenoj faras, ke ni sentas nin membroj de granda familio, la homaro.

**Mireille Grosjean**  
Prezidanto de ILEI



# Sporta tago

Help-materialo por progresemuloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

## I.

Karina (K) babilas kun siaj samklasanoj – geamikoj: Eliza (E), Makso (M), Petro (P) kaj Valtero (V), antaŭ la lernejo, post la studhoroj.

E – Hura! Komenciĝis la printempa ferio!

P – Ekde morgaŭ ni estos liberaj dum sep tagoj, kaj ni faros kion ni volas!

V – Jes, sed ne forgesu pri la proksimiĝantaj ekzamenoj!

E – Kiun tio nun interesas! Ni ĝuu la ferion!

V – Ni komencu la ferion per sporto! Por la unua tago de la ferio ni okazigu grandiozan sportan tagon!

M – Bonega ideo!

K – Jes, komence de la ferio ni sportumu!

E – Kiun, kian sporton ni elektu?

V – Necesas elekti tiun, kiun ni ĉiuj ŝatas, aŭ praktikas!


M – Ni eble faru ekskurson en la montaro, tio certe plaĉas al ni ĉiuj!

V – Por atingi la montaron ni devos veturi almenaŭ du horojn, entute eble kvin horojn ni veturos tien kaj reen, por la ekskurso restos nur kelkaj horoj, se ni ankaŭ ripozos kaj manĝos ie.

E – Tiel jam la unuan tagon de la ferio ni devos vekigi frue, por ekveturi ĝustatempe!

M – Ni faru ekskurson bicikle, ni povos ĉirkaŭbicikladi la proksiman laĝeton, entute nur 48 kilometrojn.





- V - Krom tio, se vi bicikle veturas tien kaj reen, aldonu pliajn 32!
- K - Ho, tio ja estas multe! Entute 80 kilometrojn!
- E - Mi ne havas biciklon. La malnova estas jam neuzebla.
- P - Kaj la mia estas difektita.
- M - Kio okazis al ĝi?
- P - Al ĝi mankas la ĉeno.
- M - Kiel tio eblas? Ĉu vi perdis aŭ rompis ĝin, aŭ...
- K - Ni lasu la biciklan ekskurson! Ankaŭ Eliza ne havas biciklon, kaj mi mem certe ne biciklos okdek kilometrojn!
- M - Gambojn kaj ŝuojn ĉiuj havas, ni kuradu!
- K - Mi havas pli bonan ideon: ni iru al la naĝejo! Tie estas ankaŭ saŭno, eblas sunumi sur la teraso. Krome ni povos eĉ manĝi tie, en la malgranda manĝejo, ĉe bufedoj.
- V - Do, ĉu ni voĉdonu pri la naĝado? Mi estas por! Ĉu neniu kontraŭ? Ni renkontiĝu antaŭ la Urba Naĝejo, morgaŭ!
- M - Certe ankaŭ al mi plaĉas la programo! Sed mi ne scias, kie troveblas la naĝejo.
- E - Ĝi estas norde de la urbocentro,


en parko, ĉe la finhaltejo de la aŭtobuso numero 8. Do, ni renkontiĝu ĉe la haltejo, kaj ni kune iru tien!


- P - Geamikoj, atendu! Nun enkapiĝas al mi, ke mi promesis al mia panjo akompani ŝin al la foiro ĝuste morgaŭ. Sed ni povos rendevui posttagmeze, aŭ mi aliĝos iom pli poste al vi.
- V - Tio ĉi estas simpla afero: anstataŭ morgaŭ, ni faru la naĝejan programon postmorgaŭ, kiam ni ĉiuj povos veni kaj matene renkontiĝi. Jam je la oka. Ĉu vi konsentas?
- P - Dankon, Valtero, tre bone tiel!
- K - Morgaŭ ni povos lerni, helpi hejme.
- M - Tre bone, ni konsentas! Ni revidos nin postmorgaŭ, je la oka matene! Ĝis poste!

## II.

**Eliza (E) kaj Karina (K) babilas telefone, hejme, poste en granda vendejo pri sporto, la sekvan tagon.**

- K - Halo Eliza, ĉi tie Karina parolas.
- E - Saluton Karina, kio pri vi?
- K - Mi volis demandi vin, ĉu vi havas bankostumon por morgaŭ.
- E - Jes, mi havas. Lastsomere mi aĉetis por mi novan bikinon. Ĉu vi ne rememoras pri ĝi?
- K - Jes, mi jam rememoras pri via bikino, ĝi tute bone taŭgas al vi. Sed la mia estas jam tute aĉa, ĝi plene elmodiĝis, kaj ankaŭ plivastiĝis. Necesus aĉeti novan. Ĉu vi ne emas veni kun mi butikumi?
- E - Konsentite, ni iru al la vendejo "Sporte"; ĝi estas la plej bona! Eble





K - Tiu ĉi blanka havas du malhelajn striojn ambaŭflanke. Rigardu, Eliza, ĝi sufiĉe bone sidas al mi, ĉu? Mi bezonas ankaŭ novan naĝĉapon, kiu taŭgas al la naĝvesto. Kion vi volas aĉeti por vi?

E - Sportaj ŝuoj estas necesaj, ĉar miaj estantaj ŝuoj estas jam foruzitaj. Jam delonge necesas aĉeti novajn, sed mi ne havis emon sola butikumi. Ĉu vi venos kun mi al ŝuo-magazeno?

ankaŭ mi aĉetos sportajn ŝuojn por mi. Post 20 minutoj ni renkontiĝu ĉe la bushaltejo!

K - Rigardu, Eliza, kiel interesa aparato tie estas! Por kio oni uzas ĝin?

E - Laŭ mi, ĝi estas por trejni muskolojn... Eble la ventrajn... aŭ la femurajn. Eble ambaŭ.

K - Foje mi havigos al mi iun tian. Tamen tiuj multekostas.

E - Pli simple kaj malmultekoste, se vi sen tiu kuras kaj gimnastikas. Sed ni plu iru. Ĉi tie ne estas bankostumoj.

K - Ho, gumboato! Kiel mirinde, kiam vi en tiu kuŝas kaj luliĝas sur la surfaco de iu lago, rigardas la ĉielon kaj sunumas senzorge! Eblas porti ĝin per personaŭto, aŭ eĉ bicikle.

E - Alvenu jam Karina, ĉi tie estas la bankostumoj. Ili estas diversaj.

K - Mi pensis pri tre simpla naĝvesto, el fleksebla materialo, malhela, malantaŭe dekoltita. Jen unu...

E - Ĝi estas iom tro malvasta por vi. Elektu je unu numero pli grandan. Eble tiun ĉi.

K - Ho ne! Teruran koloron ĝi havas! Mi rigardu la blankan, ĉu ne?

E - Vi ja diris, ke vi deziras malhelan.

K - Rigardu Eliza, kiel bonega paro estas tiu ĉi!

E - Ho, ankaŭ ties prezo! Ni trovu multe malpli koston!

K - Vidu, ĝuste tiajn plastajn pantoflojn mi bezonas por mia nova naĝvesto! Ankaŭ ili estas blankaj, kun bluaj strioj, mi aĉetos ilin kaj poste sekvos vin!

K - Ĉu vi aĉetis ion por vi? Do, montru, kion! Bonege! Tiuj ŝuoj aspektas tute moderne!


E - Ni havis sukcesan butikumadon. Nun ni direktu nin hejmen!

K - Jes, estas jam malfrue. Ni iru al la alia elirejo, preter la plaĝaj iloj! Rigardu tiujn surfotabulojn! Somere mi volas perlabori monon, kaj tiam mi nepre aĉetos surfotabulon por mi; mi ege deziras ellerni surfi!

E - Tiu estas vere mirinda sporto! Ĉu vi scias, ke la amiko de mia frato bonege surfas, kaj li diras, ke eblas ellerni ĝin rapide. Mi certas, ke li volonte instruos nin somere.

K - Ĉu ni ne aĉetu naĝringon ĝis tiam?

E - Ho, Karina, ne facilas butikumi kun vi! Lasu jam la sportilojn, kaj ni kuru al la tramo hejmen!



estas iom trejnadi antaŭ ol naĝi. Kio pri la knabinoj?

V – Eble ili ĵus estas alvenantaj, per tiu ĉi aŭtobuso!

P – Saluton knabinoj, bonege, ke ankaŭ vi ambaŭ jam alvenis!

E kaj K – Saluton knaboj!

M kaj V – Saluton Karina kaj Eliza! Do, ni povas ekiri al la naĝejo.

K – Estos bela tago; ni povos eĉ iom sunumi ekstere.

E – Imagu, Karina volis aĉeti ankaŭ naĝringon.

### III.

**Karina (K) babilas kun siaj samklasanoj – geamikoj: Eliza (E), Makso (M), Petro (P) kaj Valtero (V) en la bushaltejo, la sekvan tagon matene.**

V – Saluton Petro! Ĉu ankaŭ vi veturis per tiu ĉi aŭtobuso, kiel mi, sed mi ne vidis vin!

P – Saluton Valtero! Eble ĉar mi staris tute malantaŭe. Ĉu vi konas tiun ĉi naĝejon? Kia ĝi estas? Mi kutime naĝas nur somere en la Granda Lago.

V – Jes, mi ofte vizitadis ĝin. Mi ludas en la urba junulara teamo akvopilkadon, sed nuntempe mi ne partoprenas la trejnadojn. Nun mi antaŭĝojas denove esti en akvo.

M – Bonan matenon, knaboj!

V kaj P – Bonan matenon Makso!

V – Kiel vi venis ĉi tien, ĉu ne per aŭtobuso?

M – Ne, piede. Mi eluzis la okazon por iom kuradi! Estas tiel belega vetero, kaj bone

M – Ĉu vere? Ĉu vi ne povas naĝi, Karina?

K – Ha, Eliza volas primoki min. Certe mi povas naĝi!

V – Jes, Karina tre bone naĝas; mi ja povas atesti tion! Ni renkontiĝis foje en la naĝejo, kiam mi trejniĝis tie.

E – Rigardu, de ĉi tie jam videblas la naĝejo; ni nur devas trairi la parkon.

M – Ho, ĝi estas tute proksime! Ĉu ni vetkuru ĝis ĝi? Kiu aliĝas?

E – Mi!


P – Ankaŭ mi! Ek! Tri... du... unu! (Eliza, Makso kaj Petro forkuras)

K – Valtero, mi jam delonge ne vidas vin en la naĝejo.

V – Mi petis duonjaran foreston. Mi devis multe lerni por la priakceptaj ekzamenoj al la politeknika universitato, kaj ankaŭ la abiturientaj ekzamenoj terure proksimiĝas. Kaj vi...?

K – Mi naĝas sufiĉe regule, sed mi ne estas ano de iu teamo. Ni poste ankoraŭ babilos pri tio. Kial niaj geamikoj rigardas





nin tiel strange?

V – Kio okazis, geknaboj?

M – Venu nur, “naĝejanoj”! Jen afiŝo, legu ĝin!

K – (laŭte leganta) Karaj vizitantoj! La Urba Naĝejo inter la 15a kaj la 22a de aprilo pro ĝenerala prizorgado estas fermita. Malfermo: la 23an de aprilo, mardon. Ni petas vian komprenemon!

V – Kion fari? Certe al naĝejo ni ne povos iri dum nia tuta ferio!

P – Nun ni povas rekomenci la cerbumadon kaj diskuton, kiun sporton ni ludu dum nia feriado! Kiu havas ideon?

## TASKOJ

- I. 1) Legu la dialogojn kaj komprenu ilin helpe de la vortklarigoj aŭ vortaro.  
 2) Respondu la demandojn sen rigardi la tekston: **a)** Kiam kaj kial volis sportumi la geamikoj? **b)** Kiujn sportojn ili proponis? **c)** Kial ili decidis iri al naĝejo? **ĉ)** Kial volis renkontiĝi Karina kun Eliza la sekvan tagon? **d)** Kion aĉetis la knabinoj? **e)** Kial Eliza volis aĉeti por si ĝuste tion? **f)** Kie renkontiĝis la geamikoj post du tagoj? **g)** Kiel ili atingis la lokon de la renkontiĝo? **ĝ)** Kiel ili pluiris al la naĝejo kaj kial? **h)** Kiu surprizo atingis ilin?

3) Vicigu kiel eble plej multajn sportojn, kiujn oni povas praktiki en naĝejo, en lagoj aŭ en maro!

- II. 1) Rakontu, kiujn sportojn vi ŝatas spekti!  
 2) Vicigu, kiujn sportilojn vi havas!  
 3) Vicigu, kiuj sportoj estis menciitaj en la supraj dialogoj!  
 4) Prezentu la ĉefajn regulojn de almenaŭ unu sporto!

III: 1) Imagu, ke vi estas vendistino en vendejo pri sportaj varoj kaj faru dialogon kun via(j) partnero(j), kiuj deziras


aĉeti **a)** bankostumon, **b)** korbopilkon, **c)** gumboaton!

2) Rakontu **a)** en via gepatra lingvo, **b)** esperantlingve la tutan historion, kio okazis al la geamikoj, laŭ la 3 dialogoj!

3) Imagu, ke vi estas unu el la geamikoj kaj skribu leteron al via amik(in)o, en kiu vi rakontas, kio okazis al vi! 4) Imagu, ke vi estas trejnisto pri iu (enakva) sporto, kaj faru dialogon (skribe aŭ kun viaj partneroj), ke nun vi gvidas la trejnadon!

## VORTKLARIGOJ

**difekti:** fari ion neuzebla, ne taŭga; **ĉeno** (ĉe biciklo): ligilo el metalaj ringoj, el kunligitaj malgrandaj eroj, por transigi la forton al la radoj; **gambo:** tuto de la malsupra membro de homo, uzata por irado; **bikino:** bankostumo el du malvastaj pecoj; **konsenti:** havi la saman opinion; **femuro:** supra parto de la gambo; **ventro:** antaŭa parto de la homa korpo, en ĝi estas gravaj organoj; **muskolo:** tipo de karno, kiu movas la korpon de homoj kaj bestoj; **naĝvesto:** bankostumo por naĝado; **naĝringo:** plasta ringo, enestas aero por helpi resti sur la surfaco de akvo; **akvopilkado:** sporto kun pilko en akvo, inter du teamoj, kaj kun du golejoj.



# El mia kolora vivo



Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak

Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, meblojn, mangaĵojn, homojn kaj iliajn vestaĵojn: Kion ili faras? Kiujn kolorojn havas la objektoj kaj la vestaĵoj? Kio okazas sur la bildo?






Małgosia Komarnicka:


# Ludwik Hirszfelf

sciencisto, kiu preskaŭ  
ricevis Nobelpremion



En la dua pasintjara numero de *Juna Amiko*, legante la artikolon Renée Triole “Doni sangon = savi la vivon” ni eksciis, kio estas sango, kiun rolon ĝi ludas, kaj ke doni sangon estas doni la vivon...

**N**i ankaŭ eksciis, ke estas nur kvar sangaj grupoj por la tuta homaro, O, A, B, AB. Mi deziras aldoni kelkajn vortojn pri Ludwik Hirszfelf, kiu estis kunkreinto de la Leĝo de Heredo.



Li enkondukis la sistemon de indiko de sangogrupoj, kiu nun estas aplikata en la tuta mondo.

Ludwik Hirszfelf naskiĝis en Varsovio la 5-an de aŭgusto 1884 kaj mortis la 7-an de marto 1954 en Vroclavo. Li estis kuracisto, bakteriologo kaj imunologo, sed antaŭ ĉio li estis granda humanisto kaj sciencisto. Li estas kreinto de la pola imunologia skolo kaj la tute nova branĉo – sero-antropologio.

Dum la unua mondmilito li helpis venki epidemion de tifo. Dum la dua mondmilito li kun sia familio estis en la Varsovia Geto, la plej granda hebrea geto, establita de la nazia germana reĝimo. Tie li okupiĝis pri malsanuloj kaj popularigis medicinajn scion kaj higienon. Li mirakle savis sian vivon, forkurinte antaŭ la likvido de la geto.

La profesoro Ludwik Hirszfelf estas ĉefe konata danke al kreado de la scienco pri sangogrupheredo. Li demonstris, ke sangogrupojn oni heredas, kaj tio estis ege taŭga por konstato de la gepatreco. Liaj nomoj de sangogrupoj (O, A, B, AB) de la jaro 1928 estis agnoskitaj en la tuta mondo. Li ankaŭ nomis la faktoron Rh kaj malkovris kaŭzon de la serologia konflikto, kio savis vivon de multaj novnaskitoj. Antaŭ malkovro de diversaj sangogrupoj, transfuzo de la sango el unu homo al la alia ofte finiĝis per morto de la persono, kiu ricevis fremdan sangon. La profesoro Ludwik Hirszfelf siajn esplorojn priskribis en la magazino *British Medical Journal*, sed ilin oni neglektis. Nur lia publikaĵo en *Lancet* kaŭzis grandan






# Scienca

Name:  $\sigma$  Ludwik Hirsfeld  
 born on Tu, 5 August 1884  
 in Warszawa, POL  
 21e00, 52n15  
 Natal Chart (Method: Astrowiki / Placidus)  
 Sun sign: Leo  
 Ascendant: Virgo

Time: 7:00 a.m.  
 Univ.Time: 5:36  
 Sid. Time: 3:56:43

ASTRO-DIENST  
 www.astro.com  
 Type: 2.ATW 0.0-1 2-Nov-2018



| Planet      | Sign | Degree      | Time        | Other |
|-------------|------|-------------|-------------|-------|
| ☉ Sun       | ♌    | 13° 0' 34"  | Dom.        |       |
| ☾ Moon      | ♋    | 22° 56' 44" | Detr.       |       |
| ☿ Mercury   | ♈    | 4° 19' 53"  | Dom. Exalt. |       |
| ♀ Venus     | ♌    | 11° 53' 56" |             |       |
| ♂ Mars      | ♌    | 5° 6' 35"   | Detr.       |       |
| ♃ Jupiter   | ♌    | 15° 11' 5"  |             |       |
| ♄ Saturn    | ♈    | 21° 0' 29"  |             |       |
| ♅ Uranus    | ♈    | 29° 47' 13" |             |       |
| ♆ Neptune   | ♏    | 23° 13' 29" |             |       |
| ♇ Pluto     | ♏    | 2° 2' 39"   |             |       |
| ♁ Mean Node | ♏    | 17° 17' 0"  |             |       |
| ♃ Chiron    | ♏    | 8° 47' 52"  |             |       |
| ♁ Lilith    | ♏    | 7° 25' 41"  |             |       |

| RC | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|----|
| ♈  | ♈ | ♈ | ♈ | ♈ | ♈ | ♈ | ♈ | ♈ | ♈ | ♈  | ♈  | ♈  |
| ♉  | ♉ | ♉ | ♉ | ♉ | ♉ | ♉ | ♉ | ♉ | ♉ | ♉  | ♉  | ♉  |
| ♊  | ♊ | ♊ | ♊ | ♊ | ♊ | ♊ | ♊ | ♊ | ♊ | ♊  | ♊  | ♊  |
| ♋  | ♋ | ♋ | ♋ | ♋ | ♋ | ♋ | ♋ | ♋ | ♋ | ♋  | ♋  | ♋  |
| ♌  | ♌ | ♌ | ♌ | ♌ | ♌ | ♌ | ♌ | ♌ | ♌ | ♌  | ♌  | ♌  |
| ♍  | ♍ | ♍ | ♍ | ♍ | ♍ | ♍ | ♍ | ♍ | ♍ | ♍  | ♍  | ♍  |
| ♎  | ♎ | ♎ | ♎ | ♎ | ♎ | ♎ | ♎ | ♎ | ♎ | ♎  | ♎  | ♎  |
| ♏  | ♏ | ♏ | ♏ | ♏ | ♏ | ♏ | ♏ | ♏ | ♏ | ♏  | ♏  | ♏  |
| ♐  | ♐ | ♐ | ♐ | ♐ | ♐ | ♐ | ♐ | ♐ | ♐ | ♐  | ♐  | ♐  |
| ♑  | ♑ | ♑ | ♑ | ♑ | ♑ | ♑ | ♑ | ♑ | ♑ | ♑  | ♑  | ♑  |
| ♒  | ♒ | ♒ | ♒ | ♒ | ♒ | ♒ | ♒ | ♒ | ♒ | ♒  | ♒  | ♒  |
| ♓  | ♓ | ♓ | ♓ | ♓ | ♓ | ♓ | ♓ | ♓ | ♓ | ♓  | ♓  | ♓  |

interesigōn de la scienca medio. La profesoro ricevis inviton de la Rockefeller-Instituto por prelegi en Usono.

En Usono li ankaŭ ricevis bonegan finanĉan proponon de laboro. Tamen li decidis reveni en Pollandon por organizi en Vroclavo Medicinan Fakultaton de Vroclava Universitato kaj Mikrobiologian Fakultaton de Medicina Akademio. En la jaro 1954 li kreis Imunologian Instituton de la Pola Scienca Akademio, kiu ĝis nun estas altvalora scienca centro de la medicina fako en Pollando.

En la jaro 1950 li estis kandidatigita por la Nobel-premio pri medicina branĉo.

Li bedaŭrinde ne ricevis la nobel-premion, sed ricevis multajn gravajn distingojn de alilandaj atlernejoj.

La profesoro Ludwik Hirsfeld estis ne nur grandioza sciencisto, sed ankaŭ nekutime bondezira homo. Li malgraŭ kruelaj militaj travivaĵoj neniam perdis humanecon. Li prezentadis absurdecon de nazia ideologio, montrante gravecon de scienco por la bono de homaro kaj ne por justigi agojn de "malsanaj ideoj". La profesoro Hirsfeld profunde kredis, ke scienco permesas fariĝi pli bona homo. Li per sia ekzemplo montris, ke oni devas esti tolerema, kaj li vokis estimi unu la alian malgraŭ religiaj aŭ lingvaj ideoj kaj aliaj diferencoj. Li estis ankaŭ perfekta ekzemplo de instruisto. En liaj lekcioj partoprenis amasego da studentoj.

En 1953 Ludwik Hirsfeld serioze malsaniĝis. Li mortis pro koratako en sia domo, en Vroclavo, ĉe la strato Wittiga. Antaŭ lia entombigo Prezidantaro de la Pola Scienca Akademio decidis nomi de li kreitan Imunologian Instituton je lia nomo.





Renée Triolle

## Pri dentoj

Ĉu vi kalkulis, kiom da dentoj vi havas? Kaj via amiko, ĉu li havas same multajn? Kiel vi zorgas pri viaj valoraj dentoj? Vi bezonos ilin dum via tuta vivo! Meti implantaĵon kostas multege, kaj sen dentoj oni ne povas manĝi.




**L**a dentoj de bebo komencas aperi en la aĝo de 4-11 monatoj. Patrinaj diras, ke tio estas malfacila tempo, la infano ploras kaj kondutas malfacile. La unuaj dentoj kaŭzas grandan intereson en la familio kaj parenkaru. Oni demandas: Ĉu la bebo jam havas dentojn? Kiom da dentoj ĝi havas? En pluraj lingvoj oni nomas la unuajn dentojn laktodentoj. Entute ili estos 20 kaj aperos ĝis la aĝo de 3 jaroj.

Ĉu vi jam perdis iun denton? Ĉu jam novaj dentoj kreskas en via buŝo? En mia lingvo oni nomas ilin ferodentoj. Kiel vi nomas ilin en via lingvo? Ili nombros 32, kaj la lastaj "saĝodentoj" aperas, kiam ni havas ĉ. 19 - 20 jarojn. Ne ĉiu homo havos ilin. Ili ne estas nepre necesaj, kaj kelkaj dentistoj rekomendas, ke oni eligu ilin antaŭ la aĝo de 30 jaroj, ĉar ili povus kaŭzi problemojn. Kiam laktodento eliĝas, la infano ofte deziras montri ĝin. Kelkaj patrinaj kaŝas la dentojn en ujeto. En kelkaj landoj oni enterigas la dentojn kaj pensas, ke oni ĉiam loĝu tie, kie troviĝas la dentoj. En mia infanaĝo oni ĵetis la denton al muso kaj petis ĝin doni feran denton anstataŭe. Ĉu vi aŭdis pri iu tia rimajo en via gepatra lingvo?



# Kiu promesojn faras, tiu ne avaras



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**



Jen nova jaro, jen novaj ideoj. Multaj homoj skribas liston pri tiuj aferoj, kiujn ili volas ŝanĝi, fari alimaniere ol antaŭe. Aliaj ne vere

decidas, nur deziras la ŝanĝojn kaj atendas, ke ili fariĝu – se eble – per si mem.

**K**aj kio okazas ĉe niaj amikoj, la ulidetoj? Ankaŭ ili promesas diversajn aferojn unu al la alia aŭ nur por si mem. La geavoj tamen ridetas, kiam ili aŭskultas la fervorajn junulojn.


– Mi solene promesas – diris Legemulido –, ke ĉi-jare mi legos eĉ pli ol pasintjare.

– Legado ne vere estas por mi – diris Kuiremulido, – sed mi promesas, ke en la nova jaro mi elprovos ankoraŭ pli da receptoj ol pasintjare! Ĉu vi ne kredas? Mi tuj pruvas tion! Mi iras prepari la vespermanĝon.



– Kaj kiu promesas purigi iom pli ofte sian ĉambron aŭ lerni iom pli diligente en la lernejo?


– demandis la geavoj. Ilia demando ne restis sen respondo, ja Purigemulido kaj Lernemulido tuj jesis unu post la alia. Jen nova jaro, jen novaj ideoj, promesoj. Kaj ne nur ĉe la uletoj!



**Jon Kanani:  
La aŭtomobilo**

Iun tagon la aŭtomobilo pensis: – Ho, estas bela tago por preni benzino kaj lavi min. Estas ĉiam bone havi brilan karoserion.


Tiun vesperon la aŭtomobilo partoprenis plurajn konkursojn. Ĝi gajnis tri kaj perdis nur unu el ili. Ĝi kontentis.



Matene surprizo atendis ĝin antaŭ la domo. Ĝi ricevis statuon de la plej bona aŭtomobilo. Kia ĝojo!



Posttagmeze la aŭtomobilo ripozis iomete kaj kontente vidis el la fenestro la belan sportaŭtomobilon de la policistoj.



La sekvan tagon la aŭtomobilo iris al la benzinpumpilo por trinki kun siaj amikoj kaj ekscii la novaĵojn.



Aŭdinte la novaĵojn, ĝi ekhavis ideon. La jaro ŝanĝiĝis al 2019 kaj samtempe la aŭtomobilo ŝanĝis siajn kolorojn.



Per siaj novaj koloroj la aŭtomobilo gajnis la konkurson de la plej bela, kolora aŭtomobilo.

La 2an kaj la 3an lokojn gajnis ĝiaj amikoj. Jen bona jarkomenco!  
La rakonto de Jon donis al Ulideto preskaŭ tiom brilajn ideojn, kiom brila estis la karoserio de la aŭtomobilo.  
- Mi provos esti heroo dum la nova jaro! - diris Ulideto fiere. - Mi estos tre kuraĝa kaj helpos tiujn, kiuj bezonas min.



- Do, eble vi povus tuj helpi la povran katon de la malbona sorĉistino. - diris al li Ridemulido. - Se iu bezonas helpon tuj, tiu estas ĝi. Sed vi vere devas esti tre kuraĝa por eniri tiun domon! Brrr!

- Ki-kiu kato? Ki-kiu sorĉistino? Ki-kial malbona? En ki-kiu domo?









- demandadis Ulideto per pli kaj pli mallalta voĉo.

La finon jam apenaŭ aŭdis la aliaj.





- Ĉu vi ne konas la rakonton de Nathan Chidlow [*'nathan ŝildo'*]? Venu, mi rakontos ĝin al vi!

|   |   |   |
|---|---|---|
|   |                                    |    |
| <p><b>Nathan Chidlow:<br/>La malbona<br/>sorĉistino</b></p>   | <p>- Saluton, mi estas Petra kaj mi volas fariĝi la reĝino de la mondo! Estos facile, ja mi havas magian povon!</p> | <p>- Mia magia miksaĵo estas preta. Mi volas fariĝi..., mi volas fariĝi..., mi volas fariĝi io granda! Pufff!</p>   |
|   |                                    |   |
| <p>- Hor, ner! Mir refariĝas lar sorĉistinor... Pufff! - Nee! Mi ne plu estas la bela drako!</p>                                    | <p>- Mi volas fari ŝtormon! Grandan ŝtormon! Kaj ĉiuj timos mian ŝtormon!</p>                                       | <p>La kato de la sorĉistino tre timis kaj plende diris: - Ne! Mi ne volas ŝtormon! Miaŭ!</p>  |
|   |                                   | <p>La problemo estis nur tio, ke la akvokraĉanto ne havis aliajn magiajn povojn. Nek tien, nek reen... Tiel okazis, ke la domo de la malbona sorĉistino restis senviva.</p> |
| <p>- Silentu! Mi transformos vin en akvokraĉanton!<br/>- Ne, ne, ne! Miaŭ! Pufff!<br/>Sed la akvokraĉanto havis magian povon...</p> | <p>... kaj decidis transformi la sorĉistinon je ŝtono!<br/>- Ne, ne, ne!<br/>Pufff!</p>                             | <p>En ĝi eĉ hodiaŭ oni povas vidi nur la fidelan akvokraĉanton kaj unu statuon el ŝtono.</p>  |

- Ĉĉĉu vvvere? - demandis balbutante Ulido, kies vizaĝo estis pli pala ol la freŝa neĝo. - Ĉĉĉu la dddomo vvvere ekzistas? La gefratoj amuziĝis iomete pro la reago kaj iom moketis la etulon:  
- Ĉĉĉu vvvere iu vvvolis esti kkkuraĝa

ĉi-jare? Ulideto! Ne timu kaj ne tremu! Temas nur pri rakonto! Vi povas esti tute trankvila! - Ho, mi tuj pensis tion! - diris nun jam multe pli kuraĝe Ulideto.  
- Kaj mi tute ne timis! Mi ne plu estas Ulideto, sed la Kuraĝa Heroo!





- Ĉu la Kuraĝa Heroo scias, ke la magio povas esti ankaŭ bona kaj utila? Ĉu vi jam pensis pri tiuj, kiuj preskaŭ magie sukcesas malkovri novajn medikamentojn, novajn miksaĵojn, kiuj helpas

aŭ foje eĉ povas savi niajn vivojn? Tiuj lernejoj estas iom similaj al la magia miksaĵ-lernejo. Vidu la rakonton de Numa Schmucki ['numa ŝmuki'] pri Leo en la magia miksaĵ-lernejo:

|  |  |   |
|--|--|---|
|  |  |   |
| <p>Leo estis tre-tre bona magia miksaĵ-lernejo. Li multe laboris kaj havis multe da sukceso.</p>   | <p>Plej laste li faris magian miksaĵon kontraŭ vundoj. Li prenis fromaĝon kaj urtikon kaj aldonis al ili akvon kaj bieron.</p> | <p>La instruisto gratulis lin:<br/>- Tre, tre bone, Leo!<br/>Leo estis tre kontenta kaj fiera pri tio.</p>  |
| <p>Sed ĉar la urtiko pikas nin dum la plukado, nun vi devas fari magian miksaĵon kontraŭ la urtiko.</p>  | <p>Leo metis kune la urtikon, nukson kaj akvon. Bone miksis ilin, kaj... kaj denove bone sukcesis!</p>                         | <p>Intertempe vesperiĝis kaj la Ulidetoj komencis diri "Bonan nokton!" unu al la alia kaj iris lavi la dentojn kaj enlitiĝi. Ili ĉiuj faris belajn promesojn kaj unu el ili figuris sur la listo de ĉiu Ulido:<br/>Kiel eble plej bone helpi unu la alian dum la tuta jaro.</p> |
| <p>- Tre, tre bone, Leo! - diris la instruisto. Per tiu ĉi miksaĵo vi sukcese trapasis la teston kaj nun vi havas vian diplomon! Elkorajn gratulojn! Vi estas preta por plu lerni en la magia alternejo.</p> |  | <p>Leo estis kontenta, sed diris nur tion:<br/>- Nun mi devas ripozi.</p>   |
| <p>Leo estis kontenta, sed diris nur tion:<br/>- Nun mi devas ripozi.</p>  |  |   |





Luiza Carol

# Ĉu estas facile ŝanĝi siajn dietajn kutimojn?

Pri “La vegetara leono” de Lode Van de Velde, kun ilustraĵoj de Alice Germain, 2018, 48 paĝoj, 228,6 x 177,8 mm, havebla ankaŭ en pdf-formato\*. Eldonejo Libera.

**M**i konas multajn homojn, kiuj ja dezirus nutri sin sen viando, por fariĝi pli sanaj kaj samtempe por protekti la bestojn; tamen ili opinias, ke estus malfacile realigi tiom drastan ŝanĝon de dieto kaj senfine prokrastas tian decidon. Mi konas eĉ infanojn, kiuj pensas ĝuste same, kvankam infano ne povas diri, ke jam de multaj jardekoj ĝi alkutimiĝis al sia nuna dieto, ĉu ne?

Por tiuj, kiuj pripensas ŝanĝon de dieto, tiu ĉi libro entenas tre kuraĝigan porinfanan rakonton. En ĝi temas pri leonido, kiu ekkompatis la senkulpajn bestojn, per kiuj ĝia familio nutris sin. Li estis tiom decidema kaj persistema, ke li sukcesis ŝanĝi sian dieton kaj eknutris sin nur per bongustaj plantoj kaj ovoj. Li ekamikiĝis kun bubalido, gazelido kaj zebrido, kaj ludis kune kun ili.

La rakonto estas ilustrita per ĉarmaj ilustraĵoj, tiel ke vi certe ekamos la kuraĝan leonidon. Ĉu vi miras, ke mi konsideras lin kuraĝa? Jes, laŭ mi kuraĝulo li estis, ĉar necesas kuraĝo por elekti sian propran dieton kaj firme realigi



drastan admirindan ŝanĝon en sia vivo. La dua parto de la libro ne estas beletraĵo, sed artikolo pri la reala vivo. Tie vi trovos kelkajn ĝeneralajn informojn pri la normalaj leonoj, kiuj ĉasas aliajn bestojn por nutri sin. Sed la artikolo fokusigas al la eksterordinara vivo de vera leonino, kiu dum sia tuta vivo rifuzis manĝi viandon. Vi povos vidi ankaŭ ŝian foton, kie ŝi aperas apud du kokidoj, kiujn ŝi rigardas milde. Tiu nekutima leonino vivis en Usono inter la jaroj 1946 kaj 1955 kaj estis tre fama en la tuta mondo.

En la okazo, ke tiu artikolo igus vin provi ŝanĝi la dieton de via dorlotbesto, indas peti konsilon de bona bestkuracisto. Mi ja aŭdis pri vegetaraj hundoj, kiuj manĝas panon kaj terpomojn kaj ankaŭ relative multajn semojn, fabojn, ovojn k.a. Tiaj hundoj estas fortaj kaj kutime vivas longe. Katoj bezonas eĉ pli grandan procenton da proteinoj en siaj manĝaĵoj ol hundoj. Do, por nutri katon sen viando oni devas nepre aldoni al iliaj manĝaĵoj specialajn proteinojn, kiujn la bestkuracisto rekomendus. Eĉ tiel, verŝajne la katoj revenus al siaj kutimaj ĉasadoj tuj kiam ili elirus el via domo, ĉar ĉasbestoj naskiĝas kun instinkto pri ĉasado. (Tiu rakonto pri la vegetara leonino rilatas al TRE malkutima okazaĵo.)

Feliĉe, homoj povas tre facile vegetaran-igi se ili deziras tion. Infanoj kaj adolesk-



uloj bezonas pli multajn proteinojn ol plenkreskuloj; do, bona dietisto povus rekomendi al vi manĝaĵojn plenajn je proteinoj, kiel ekzemple nuksojn, semojn, tofuon, fabojn k.a.

La tria parto de la libro enhavas 11 tre facilajn vegetarajn receptojn, kiujn la infanoj kaj la gepatroj povus prepari kune. Fakte ĉiuj receptoj ŝajnas facilegaj kaj allogaj, sed la plejmulton el ili oni povus realigi nur kun infanoj relative grandaj, al kiuj la gepatroj jam permesas uzi tranĉilon. Nepras la ĉeesto de plenkreskulo, kiam necesas funkciigi miksilon, eventuale raspilon, fornon aŭ fornelon, sed la tutan reston la infano povus prepari sola.

La plej facila el tiuj receptoj ŝajnas al mi tiu pri glaciaĵo. Eĉ tre eta infano, al kiu ankoraŭ ne estas permesate uzi tranĉilon, povus prepari tian bongustan glaciaĵon laŭ kelkaj variantoj. La recepto postulas pecojn da maturaj bananoj, kiujn oni konsilas konservi en frostujo. Indas ne doni al la infano la bananpecojn rekte el la frostujo, por ke ili ne estu tro malmolaj por miksado. Se oni atendas ĝis ili moliĝas, la infano povas facile enigi ilin en la miksado. Por la miksado mem ne necesas miksilo, ĉar eblas uzi kuleron. (La recepto postulas sojlakton, sed mi anstataŭigis ĝin per rizlakto, kiun mi kutime havas en la domo. La rezulto plaĉis al mi.)




Preskaŭ same facila kiel la recepto pri glaciaĵo estas tiu pri “gazpaĉo” (malvarma supo el suda Hispanio). Ĉar tiu ĉi tamen postulas uzadon de tranĉilo, do oni povas realigi ĝin nur kun iom pli grandaj infanoj. Ĝi ankaŭ postulas uzadon de miksilo, kiun plenkreskulo devas funkciigi. Fakte la recepto konsistas el bongusta salato, kiun ĉe la fino oni aliformas en malvarman supon pere de miksilo. Se oni volas lasi la infanon prifieri pri tio, ke li/ ŝi jam kapablas kuiri sen ajna helpo de plenkreskulo, oni povas rezigni pri la miksado kaj uzi la saman recepton nur por prepari la salaton, ĉar ankaŭ tiu bongustas.

Min aparte entuziasmigis la recepto pri karotkuko. Ĝi postulas funkciigon de raspilo kaj forno, kaj do la helpo de plenkreskulo nepras. Por realigi tian kukon la infano devas esti kapabla uzi pesilon, aŭ eklerni uzi ĝin tiuokaze. La preparo mem estas ne nur facila sed ankaŭ amuza, precipe kiam venas la momento por dekoracii la kukon per nuksoj. Kiu preferas, ke la kuko ne estu tre dolĉa, tiu povas rezigni pri la aldono de tre dolĉa kremo sur la jam finitan kukon. Guste tion mi decidis kaj pro tio la preparado fariĝis eĉ pli facila kaj rapida.

Aliajn receptojn mi ankoraŭ ne provis, sed ili ĉiuj ŝajnas al mi allogaj.

Mi tutkore rekomendas tiun libron kaj al infanoj, kaj al iliaj gepatroj.





Mireille Grosjean

# Kiom stultan ideon mi havis...

**“Ĉu vi povus doni al mi 10 eŭrojn, unu monbileton de 10 eŭroj?” – li demandis al mi. Ĉu almozulo? Ĉu ŝtelisto, kiu atendas, ke mia monujo estu en miaj manoj por preni ĝin?**

**M**i estis misfida... Mi sidis en la granda halo de la senegala flughaveno kaj devis atendi tie kelkajn horojn antaŭ mia ekflugo. Do mi sidis sur benko, sola, atendis, ĉu legante, ĉu songante, ĉu observante, mi ne memoras.

Tiu alta nigrulo venis al mi kaj ekparolis. Li surhavis ian uniformon, tamen mi ne konis tian uniformon. En la halo estis multaj vojaĝantoj kaj diversaj personoj en uniformo, kiel oficistoj, policistoj, purigistoj, portistoj. Mi ne povis kompreni, al kiu grupo li apartenis. Li ne havis armilojn, do li ne estis policisto. Li surhavis veŝton kiel parton de sia uniformo. El unu poŝo de sia veŝto li prenis monerojn, kelkajn, kaj montris ilin al mi en sia malfermita mano. “Jen 10 eŭroj. Ĉu vi povus doni al mi monbileton de 10 eŭroj kaj mi donos al vi 10 eŭrojn en metalaj eroj?” Tiam mi komprenis. Mi sciis, ke la bankoj ne ŝanĝas monerojn, ili ŝanĝas nur biletojn, paperan monon. Do tiu sinjoro havis monerojn kaj bezonis paperan monon por povi ŝanĝi ĝin. Laŭ mia supozo li estis portisto. Kiam turistoj el Eŭropo alvenas al Dakaro, li helpas ilin porti la valizojn de la bagaĝa karuselo al la taksio. Li ricevas etan salajron por tio, en metalaj



moneroj, ĉar oni ne donas 10 eŭrojn por tia servo, nur unu aŭ du. Eŭropanoj ne povas akiri senegalan monon en Eŭropo antaŭ ol alveni, tion ili povas akiri nur surloke. Pro tio li ricevas monerojn en eŭroj, kaj li bezonas monbiletojn por iri al iu banko kaj ricevi frankojn FCFA (XOF), kiuj estas la senegala valuto. Kiam mi komprenis tion, ni komencis nombri la eŭrojn ĝis dek kaj ni interŝanĝis la sumon. Bone. Poste li demandis: “Ĉu vi havus ankoraŭ monbileton de 10 eŭroj?” Jes, mi havis. El alia poŝo de sia veŝto li prenis kelkajn monerojn, nombris ilin sur sia mano: 10 eŭroj. Ni interŝanĝis la sumon. Li plu demandis pri plia monbileto, mi denove jesis, kaj li donis al mi pliajn monerojn.... Kaj tiam mi demandis: “Kiom da eŭroj vi havas entute?” Tiam li nombris siajn poŝojn: kvar en la veŝto, ses en la pantalono. En ĉiu poŝo estis dek eŭroj. Mi havis tiun sumon en monbiletoj. Ni nombris la monerojn dum preskaŭ 30 minutoj, sidante sur benko, kiel ludantaj infanoj. Li estis tre feliĉa. Mi akiris pezan sakon kun multe da moneroj kaj devis porti tion al Svislando. Poste dum kelkaj monatoj mi uzis en Francio nur monerojn por ion pagi en tiu najbara lando, kiu apartenas al la eŭro-zono. Svislando ne. Mi supozas, ke li ricevis ankaŭ monerojn de siaj kolegoj kaj imagas, ke li iris al banko, ricevis FCFA kaj zorgeme redonis al siaj kolegoj la precizan sumon, kiun ili transdonis al li por ŝanĝi. Mia konsento montriĝis utila al ili ĉiuj. Tiuj sumetoj estis ilia salajro; per tiaj sumetoj ili sukcesas vivteni sin kaj siajn familianojn.



# Renato Corsetti Ĉu Mireille Grosjean kapablas mensogi?

**Certe, se oni estas virino, oni devas kapabli mensogi. Sen mensogoj, aparte sen blankaj aŭ bonintencaj mensogoj, nia socio ne povus ekzisti.**

**S**e ĉiu neesperantisto, kiu renkontas esperantiston, dirus al li tion, kion li vere sentas: “Vi, sentaŭgulo, tempo-perdanto pri neniam realigotaj utopioj, bonvolu ne paroli kun miaj infanoj!”, kaj esperantisto respondus: “Vi, abomeninda praktikulo, sekvanta nur la ideojn, kiuj gajnigas al vi monon, kaj kiuj en la fino detruos la mondon, iru for de idealistoj!”, sociaj rilatoj apenaŭ eblus.

Cetere, virinoj kapablas mensogi pli ol viroj, ĉar ili estas pli socie inteligentaj ol viroj, kaj la kapablo mensogi estas konata al ĉiuj interesiĝantoj pri bestoevoluado, kiel la vera distingilo inter besto kaj homo. Hundo ne kapablas mensoge blekegi, kiam ĝi ne intencas mordi. Nur simioj, en kelkaj okazoj uzas mensogojn kaj tio estas signo, ke ili estas proksimaj al ni.

Ĉi tiu tro longa enkonduko utilas nur por kaŝi la banalecon de ĉi tiu artikoleto.



En Romo ekzistas io, kio havas la nomon “Buŝo de la vero” [*bocca della verita’/ boka de la verita’* en la itala]. Temas pri praa akvodefluilo – kiam oni paciencis fari artismajn akvodefluilojn, sed en la Meza Epoko ĝi estis fiksita al la muro de preĝejo, kaj ekestis la legendo, ke, se vi metas vian manon en la malfermajon de la buŝo kaj vi mensogas, via mano estos formordita [en la realo,

kiam nobelulo volis pruvi, ke lia servisto mensogis, aliaj servistoj de tiu nobelulo kaŝis sin malantaŭ la muro, kaj tranĉetis la enmetitan manon per tranĉilo, tiel ke la mano sanguj]. Tiam floris pluraj rakontoj pri okazaĵoj veraj aŭ imagitaj. La plej konata estas ĉi tiu: virino havis amanton, kaj la edzo decidis, ke ŝi pruvu sian fidelecon per enmetado de la mano en la buŝon de la vero. Granda popolamaso kolektiĝis por ĝui la spektaklon. Abrupte el la homamaso juna homo alkuris al la virino, kisis ŝin publike kaj forkuris tra la homamaso, farante kriojn de frenezulo. Ĉiuj ridis kaj pensis, ke temas pri unu el la stultuloj de la urbo. Fakte temis pri la vera amanto de la virino. Post tio la virino diris: “Mi ĵuras, ke neniu viro dum mia vivo kisis min krom mia edzo kaj tiu ĵusa frenezulo.” Post tio ŝi enmetis la manon kaj reprenis ĝin nemordita. Bela ekzemplo

de virina lerteco. Sian lertecon pruvis ankaŭ Mireille Grosjean, la prezidantino de ILEI, kiu por pruvi sian sincerecon uzis imiton de la vera buŝo de la vero, kiu ekzistas en Les Brenets okaze de ekspozicio *Landart*. Komparu la fotojn de la vera buŝo kaj de la imitita buŝo el ligno kaj konvinkigu.



# Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,  
ul. Kilińskiego 14/3,  
PL-59-300 Lubin,  
Pollando, rete:  
*malgosia.*  
*junaamiko@gmail.com*



## Nova jaro kaj novaj decidoj


Kiel kutime, komence de ĉiu jaro mi provos konvinki vin al grava decido; tio estas al legado de libroj.

**Ĉ**u vi scias, ke sufiĉas nur 6 minutojn de legado por redukti nian streson je 60%! Legado trankviligas kaj malrapidigas korbataĵon. Ĝi ankaŭ plifortigas nian memoron, ĉar dum legado ni memoras multajn detalojn, ekz. antaŭnomojn de la herooj aŭ urboj, diversajn historiojn, lokojn ktp. Tiam en nia cerbo kreiĝas novaj sinapsoj kaj tiuj jam ekzistantaj plifortiĝas. Legante disvolviĝas nia sentemo ne nur por arto, sed ankaŭ por alia homo. 82% da legemuloj volonte monhelpas filantropiajn organizaĵojn. Legado formas nian personecon kaj donas al ni novajn spertojn, kiujn ni certe neniam travivadis. Ĝi ankaŭ helpas ekdormi; tial valoras ĉiuvespere krei specialan kutimon de legado. Tiam nia korpo ricevas signalon, ke jam estas tempo por dormi. Kaj vi? Kial vi legas?



Legu, legu, legu!

## Klubo de bona libro





**L**a Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponoj kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

## Rekomendo

**P**or la Biblioteko de *Juna Amiko* Aleksander Pecyna, pola esperantisto, vicdirektoro de la mezlernejo en Złotoryja, rekomendas legendojn pri sia urbo. La legendoj

estas troveblaj interrete kaj parto el ili broŝurforme estis eldonita de Fondaĵo Archeo kiel komikso. La komikso enhavas 56 paĝojn, sur kiuj troviĝas sep konataj kaj nekonataj historioj bildforme sub la komuna titolo *Legendy Złotoryjskie*. Interalie oni povas tralegi interesajn legendojn pri koboldoj, husanoj kaj varmaj bulkoj. Ĉiuj legendoj estas buntkoloraj. Ni planas traduki ilin al Esperanto\*.

Legante la legendojn vi transportas vin al alia mondo, al la mondo de magio kaj imagitaj mirindaĵoj, sed vi ankaŭ retrovos la veron. Vi havos eblecon kompari historiajn faktojn kaj spuri la enhavon de la legendoj, kiuj ŝanĝiĝas dum jarcentoj.

Fine de la rubriko vi tralegos legendojn, kiuj ne troviĝas en ĉi tiu libreto.

## Ekkonu legendojn kaj vizitu la landon

Konkurso ne nur por junaj legantoj

Ĉi-foje mi deziras prezenti al vi du polajn urbojn, Vroclavon kaj Złotoryja. En ĉi tiuj urboj inter la 23-30 de majo okazos la 4a Interkultura Majrendevuo,



kiu konsistas el la 5a Internacia Simpozio kaj la 7a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kaj multaj prelegoj, laborsesioj, ekskursoj, amuzajoj.



\*) La legendoj en la pola: [www.zamkipolskie.net.pl/pages/zamki/zlotoryja/zlotoryja\\_legendy.htm](http://www.zamkipolskie.net.pl/pages/zamki/zlotoryja/zlotoryja_legendy.htm)  
[www.polskatradycja.pl/legendy/dolnoslaskie/80-duch-ze-zlotoryi.html](http://www.polskatradycja.pl/legendy/dolnoslaskie/80-duch-ze-zlotoryi.html)





**Vroclavo estas la ĉefurbo de la pola regiono Malsupra Silezio, kaj Złotoryja estas “la ĉefurbo de la pola oro”.**



**V**roclavo (pole *Wrocław*, legu: *Vrocüaf*) situas en la sudokcidenta parto de Pollando ĉe la rivero Odro kaj estas la ĉefurbo de la pola regiono Malsupra Silezio. Ĝi estas la kvara plej granda urbo de Pollando, grava centro de scienco kaj kulturo kaj ofte estas nomata: “la urbo de renkontiĝoj”. Laŭ legendo, Vroclavo estis fondita ĉirkaŭ la jaro 1000 fare de la ĉeĥa princo Vratislav la 1-a, kaj ĝi estis nomita laŭ lia nomo.

En 2016 Vroclavo estis Eŭropa Kultura Ĉefurbo kaj laŭ Unesko la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro. En Vroclavo naskiĝis la Patronino de Eŭropo, Edith Stein, doktorino de filozofio kaj monahino.

Vroclavo estas belega urbo kun riĉa historio kaj neordinara aspekto. Ĝi estas urbo de 12 insuloj kaj 112 pontoj. La urboplaco je la areo 3,6 hektaroj apartenas al unu el la plej grandaj en Eŭropo. Ĝi konservis sian spaco-sistemon de la dua duono de 13-a jarcento. Vizitante la



urbon vi nepre devas viziti la Muzeon de Sinjoro Tadeo, la pentraĵon Panoramo de Raclawice (unu el dekelkaj panoramaj pentraĵoj konservitaj en la mondo) ekspoziciatan en la filio de la Nacia Muzeo en Vroclavo, la konstruaĵon Hala Stulecia (Halo de Jarcento), kiu en la jaro 2006 estis enskribita en la liston de mondaj kulturaj heredaĵoj de Unesko, kaj la novan parton de la vroclava zoo, nomata pollingve afrykarium, kiu estas komplekso (la unua kaj sola en Pollando) prezentanta la akvan kaj surteran ekologiajn sistemojn de la afrika faŭno.

En Vroclavo, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado ĉiujare organizas la Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj, la Internacian Simpozion, la Vortbelecon en Esperanto, la Interkulturan Majrendevuon kaj multajn programojn por kaj kun neesperantista medio pruvante, ke valoras profiti ĉiun okazon por informi pri Esperanto kaj por vigligi kunlaboron kun neesperantaj medioj.



**Z**łotoryja (legu: *Züotorija*) estas pitoreska urbo meze de la distrikto Malsupra Silezio. Ĝi estas la ĉefurbo de la pola oro. Ĝis nun ekzistas subteraj koridoroj(irejoj) de la orminejo “Aurelia”.

En 1211 Złotoryja ricevis la magdeburgan juron kaj fariĝis la plej malnova urbo de Pollando. La urbo en la 12 jarcento estis ankaŭ la centro de la sal-kaj-drapkomerco kaj en la 16 jarcento venis ekonomia disvolvo kaj interalie estis





konstruita bierfarejo. Złotoryja en sekvaj jarcentoj perdis sian gravan rolon pro inundoj, brulegoj kaj militoj.

Al la vidindaĵoj de la urbo apartenas interalie: la historia urboparto, la preĝejoj (12j/14j), la mezepoka Pordego kun kastelturo Kowalska (14j), la mezepokaj defendomuroj (14j), la muelejo (14j), la akvoturo (17j) kaj la torturejo (18j). Valoras viziti ankaŭ orminejon “Aurelia” kaj muzeon de oro.

Ĉi-jare en Złotoryja okazos unua parto de la 4a Interkultura Majrendevuo: AMO-seminario, laborsesioj, ekskursoj, serĉado de oro, solena koncerto por la loĝantoj de Złotoryja. Ni ankaŭ vizitos apudajn ĉirkaŭaĵojn: la kastelon en Grodziec kaj landon de estingiĝintaj vulkanoj. Ĉiutage ni dancos, kantos kaj laŭ deziro aranĝos lignofajron kun rostitaj kolbasetoj kaj legomoj. Muzike akompanos nin JoMo kaj Suzana.



Serĉado de oro en Złotoryja

## Poeziaĵoj kaj legendoj

**Mi proponas la poeziaĵon pri la rivero Odro de Halina Kuropatnicka-Salamon, nia fama Esperanto-poetino kaj la legendojn pri Złotoryja, kiujn preparis Aleksander Pecyna, esperantisto kaj la vicdirektoro de la mezlernejo en Złotoryja. Li ankaŭ helpis al mi prepari informojn pri sia urbo.**

### River' Odero

*Verdaj bordoj, blua akvo, dancanta zefiro.  
Ĵetu monon en riveron kun propra deziro.*

*Venos tagoj kaj monatoj, eĉ jaroj foriros,  
sed konstante vi al Oder', al Vroclav' sopiros.*

*Rememoru, ne forgesu adiaŭan ploron.  
Ĉu momente vi dronigis? Eble nure koron?*

### Kristnaska Antaŭvespero

Ĝis hodiaŭa tago en Złotoryja, en ĉiu Kristnaska Antaŭvespero, antaŭ noktomezo okazas Ora Kristnaska Antaŭvespero. Jam 450 jarojn la urbanoj unue renkontiĝas sur la urboplaco, kune kantas pastoralojn (kristnaskajn kantojn) kaj poste iras al preĝejo. Tiu kutimo devenas de la jaro 1553. Tiam terura epidemio mortigis preskaŭ ĉiujn loĝantojn de la urbo. Laŭ la legendo sian vivon savis nur sep personoj, interalie la tiutempa urbestro de tiu belege disvolviĝanta, bruanta Złotoryja. Li kune kun ses



personoj en Kristnaska Antaŭvespero sur la urboplaco komencis kanti pastoralojn. De tiu momento ĉiun jaron ĝis la jaro 1944 la urbanoj renkontiĝis sur la urboplaco, kune kantis pastoralojn kaj poste iris al preĝejo. Tiu belega tradicio estas daŭrigata de la jaro 1995.

## Fantomo de la orminejo

Antaŭ longa tempo, kiam serĉado de la oro estis tre pena kaj danĝera laboro, sed donis rapidan riĉon, al unu tre malriĉa ministro el Złotoryja okazis ĉi tiu historio. Li unu fojon trovis fine de la minejo grandan orvejon, sed ne deziris pri tio informi siajn kolegojn. Li deziris havi oron nur por si mem. Li do prenis nur malgrandan peceton por travivi danke al ĝi kun la familio kaj reston de la oro bone kaŝis. Per tiu granda parto de la oro li deziris aĉeti belan, neĝblankan robon por sia filino Aurelia kaj organizi ŝian komunan feston.

Kiam proksimiĝis la festa tago, la ministro kaŝe eniris en la minejon nur kun unu lampeto. Li trovis “sian” oron, enpoŝigis ĝin kaj prenis tiom, kiom li scipovis porti. Tamen, kiam li provis forlasi minejon, lia malgranda lampeto ĉesis lumi kaj la ministro perdis la vojon. Sekvan tagon liaj kolegoj kaj familianoj serĉadis lin, sed senrezulte.



La orminejo Aurelia en Złotoryja



Dum la Unua Komunio Aurelia ploris, atendente sian patron. Ŝiajn larmojn akompanis el sub la tero ploro de la ministro. De tiu momento ĉiujare, maje, kiam la infanoj en Złotoryja havas komunan feston, estas aŭdebla la malespera kaj sopira voĉo de la fantomo de la orminejo “Aurelia” pro lia filino.

## La konkursa tasko

Respondu sekvajn demandojn:

1. Kiu urbo estas la ĉefurbo de la pola regiono Malsupra Silezio.
2. Kiel Vroclavo estas ofte nomata?
3. Ĉe kiu rivero ĝi situas ?
4. Kie okazos la 4a Interkultura Majrendevuo?



5. Kiu urbo estas la ĉefurbo de la pola oro?
6. En kiu urbo kaj kial oni festas Kristnaskan Antaŭvesperon sur la urboplaco?
7. Kie troviĝas la orminejo “Aurelia”?
8. Kion deziris havi unu ministro el Złotoryja? Ĉu li sukcesis plenumi sian deziron?
9. Kiu skribis la poeziaĵon pri la rivero Odro kaj kiel ĝi nomiĝas?

Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) bildforme prezentos la legendojn. La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adresoj kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 30a de marto 2019 al la adreso: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątają 26A, PL-50-007 Wrocław, Pollando.

La valorajn premiojn fondis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.



# uea.facila

FACILAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO



## Nova retejo de UEA

La 19an de januaro ĉi-jare aperis nova retejo de UEA. Ĝia nomo estas uea.facila, kaj ĝi estas videbla ĉe: <https://uea.facila.org>

Ĝia celo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo. Tial ĝi estas taŭga por lernantoj, sed espereble ĝiaj mallongaj novaj artikoloj povus esti interesaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj. Ĝi estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA por legi ĝin kaj komenti.

La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperanto-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, informoj pri filmetoj kaj aliaj materialoj troveblaj tra la reto, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj. Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub

la artikoloj, prezenti sin en la paĝo “Niaj legantoj”, kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj.

La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de Kontakto, nun reviziita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj Interreto, dum estis forigitaj kelkaj vortoj, kiuj ne ofte estas bezonataj en tia retejo. La reviziita vortlisto troviĝas ĉe: <https://uea.facila.org/vortlisto/>

La ĉefredaktoro estas Anna Löwenstein, kaj jam formiĝis tuta reto de kunlaborantoj. Emilio Cid, estrarano de UEA, subtenis la projekton ekde la komenco, kaj estas grave menciigi la kontribuon ankaŭ de ESF, kies subvencio necesas por ricevi la helpon de profesia programisto.

Por kontentigi la bezonojn de la novaj esperantistoj, Anna Löwenstein ekrlatis kun ILEI kaj Stano Marček, la redaktoro de ties revuo *Juna Amiko*. En tiuj kontaktoj tuj vidiĝis, ke tekstoj el *Juna Amiko* aperos en la retejo uea.facila kaj inverse. Jen pozitiva kunlaboro.

**Rafael Henrique Zerbetto**  
([esperanto.china.org](http://esperanto.china.org))





# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, [malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie...**

**Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, permesas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiumaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agreeblecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

La kanton *Eta eta birdo* por la legantoj de *Juna Amiko* rekomendas Vasil Kadifeli, turka esperantisto, emerita komputika programisto, la ĉefredaktoro de la revuo *Turka Stelo*. Vasil serĉis la aŭtorojn de la



vortoj kaj la muziknotoj, sed probable ili estas anonimaj kaj plej verŝajne ilin komponis iu instruisto pri muziko.

## *Eta eta birdo*

*Eta eta birdo frostiĝis*

*En mia fenestro sidiĝis*

*Eta eta birdo frostiĝis*

*En mia fenestro sidiĝis*

*Mi prenis ĝin ene*

*Por ke ĝi pepu "ĝik ĝik ĝik ĝik"*

*Frapante siajn flugilojn ĝi reviviĝis*

*Rigardu, rigardu, miaj manoj malpleniĝis*

*Frapante siajn flugilojn ĝi reviviĝis*

*Rigardu, rigardu, miaj manoj malpleniĝis*





## Mini Mini Bir Kuş

*İki Tebrar*

F B♭ Gmin C7 F B♭ Gmin F

Mi ni mi ni bir kuş don muş tu Pen ce re me kon muş tu Al dım o mu i çe ri ye  
Fa Fa Fa Fa Fa Do Fa Sol LA Sib Sib Sol Sol La Sol Fa Sib Sib Sol Sol La La Fa Fa

www.cocukgezegeni.com

7 B♭ Gmin F F B♭ Gmin C7 F

Cik cik cik cik öt sün di ye Pır pır e der ken can lan da el le rim bak boş kal dı  
Sib Sib Sol Sol La La Fa Fa Fa Fa Fa Do Fa Sol La Sib Sib Sol Sol La Sol Fa

www.cocukgezegeni.com



### Bonvolu respondi:

1. Kie sidiĝis la eta birdo?
2. Ĉu ĝi frostiĝis?
3. Kiu prenis ĝin?
4. Kion faris la eta birdo por reviviĝi?
5. Kies manoj malpleniĝis?
6. Desegnu la etan birdon laŭ via imagpovo.

### Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo!

La turka versio de la kanto estas aŭdebla kaj videbla en Jutubo ĉe:  
<https://www.youtube.com/watch?v=QWiXfvNPHmw>





Rubrikestro:  
Elena Nadikova,  
Esperanto-klubo "Betuleto"  
Lernejo/Ŝkola 56,  
pr. Traktorostroitelej, 38  
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio  
[lena\\_espero@mail.ru](mailto:lena_espero@mail.ru)



# Leteroj por orienta fabelo...

## Saluton, karaj legantoj!

**Interkultura Mondo tutanime gratulas vin okaze de la nova jaro 2019! Ni deziras al vi sanon, feliĉon kaj prosperon! Fartu bone kaj pace!**

**V**erŝajne dum la pasintaj festoj vi ofte kaj multe skribis, karaj legantoj.

Ja necesas gratuli ĉiujn parencojn, amikojn, simple konatulojn! Kaj diri al ili agrablajn kaj bonajn vortojn!

Se vi ŝatas tion fari, nia suba rakonto estos alloga por vi. Temos pri tre interesa projekto pri leteroj. Ĝi nomiĝas Internacia Letertago. La ideo naskiĝis en la mirinda urbo Samarkando.

En la regiono Centra Azio estas unika lando Respubliko Uzbekio. Ĝi situas en belega pitoreska oazo. Ĝia naturo ĝojigas okulojn. Vi povas vidi tie imponajn montojn kun neĝaj ĉapeloj, serpentum-antajn riverojn kun kristala akvo, verdajn valojn kaj bluajn lagojn.

Uzbekio havas antikvan kaj unikan kulturon. Estas multe da malnovaj monumentoj en la lando. Multas belegaj orientaj palacoj, konstruaĵoj de antikva arkitekturo. La tradicioj kaj kutimoj estas originalaj kaj tre allogaj. Tra Uzbekio iam iris la fama Granda Silka Vojo.



Islama lernejo Tillja-Kori

Do, indas viziti Uzbekion! Kaj hodiaŭ ni invitas vin al Samarkando. Ĝi estas la tria plej granda urbo en Uzbekio. Kaj unu el plej antikvaj urboj en la mondo!

Ĝi aperis en la 8-a jarcento antaŭ Kristo. En la 14-a jarcento Samarkando estis ĉefurbo de la imperio de Timur. Multaj arkitekturaj ĉefverkoj staras en la urbo de tiu tempo.

Do, karaj legantoj, se vi volas senti vin kiel heroo de orienta fabelo, venu al Samarkando! Des pli, ke la urbo havas bonajn Esperanto-tradiciojn. Jam dum pli ol 40 jaroj tie ekzistas la klubo de internacia amikeco "Esperanto". Ĝin fondis en 1977 kaj gvidas ĝis nun Anatolij Ionesov, fama sovetia, nun uzbekia esperantisto. Li estas ankaŭ aŭtoro de la enciklopedia projekto "Samarkandiana". Samarkanda "Esperanto" iam estis unu el la plej aktivaj kaj konataj Esperanto-kluboj en la tuta eksa Sovetunio. Ĝi havas propran ejon en la urba kulturcentro "Amir Temur" en Samarkando.



Fine de la 1970-aj jaroj la klubanoj komencis organizi Vesperojn de Leteroj. Tio estis tre populara agad-formo de Esperanto-kluboj tra la tuta mondo.

Homoj el diversaj landoj volonte korespondis pri iuj temoj. Nun estas epoko de interreto. Ĝi dum minutoj portas niajn mesaĝojn ien ajn. Sed antaŭ 50 jaroj homoj skribis leterojn sur paperoj. Kaj ofte longe atendis respondojn – pere de ordinara poŝto. Tamen kia ĝojo estis ricevi leteron de amikoj el alia lando!

La anoj de la samarkanda Esperanto-klubo same ŝatis korespondi. La leter-vesperoj daŭre okazis dum jardekoj – pere de Esperanto! Necesas mencii, ke de komenco tiu projekto estis malfermita al ĝenerala publiko! Ĉiuj povis partopreni tiujn internaciajn kontaktojn. Poiome letervesperoj iĝis grandskalaj eventoj. Nun, post pli ol 30 jaroj, Internaciaj Letertagoj daŭras kelkajn semajnojn – ĝis unu monato! Jen kia sukceso en interkultura interŝanĝo, ĉu ne?

Dum jardekoj samarkandaj esperantistoj ricevis plurajn milojn da leteroj kaj aliaj kontribuajoj el pli ol 100 landoj el ĉiuj kontinentoj. Impona geografio, ĉu, karaj legantoj? Ankaŭ vi povas partopreni tiun valoran kaj interesan projekton. Sendu mesaĝojn, leterojn, bildkartojn al la antikva Samarkando!

Temoj por tiuj leterŝanĝoj estas variaj. La plej popularaj iĝis laŭtemaj Internaciaj Letertagoj “Novjarajn Gratulojn, Samarkando!”, “Vorto pri Samarkando” kaj “Assalomo, Naŭruzo!”

Dum la jarŝanĝa sezono samarkandaj samideanoj organizas Internaciajn Letertagojn “Feliĉan Novjaron, Samarkando!” Venas multaj gratuloj kaj salutoj. Sojlo de la Nova Jaro estas tempo speciala, apudlima, ekscita. Ĝi havas ion simblan, gajan kaj sakramentan. Dum tiuj ĉi tagoj ni ĉiam volas rememori pri la pleja bono. Ni pensas pri la plej sopirataj deziroj kaj revoj. Ni volas krei kaj kundividi bonon kun aliaj homoj. Do, ĉiun fojon la jarŝanĝaj



festoj kunigas kaj lumigas homojn de diversaj landoj kaj kontinentoj. Tio helpas fari nian mondon pli bela kaj pli bona.

Ĉiuoktobre okazas la Internaciaj Letertagoj “Vorto pri Samarkando”. Ili estas dediĉataj al la Tago de la Urbo. Oni festas ĝin la 18-an de oktobro. Tio estas signifplena dato kaj festa okazaĵo por Samarkando. Multaj loĝantoj de la terglobo ŝatas pensi, memori, revii kaj paroli pri la urbo. Eblas diri, ke dum tiu tago Samarkando kunigas la mondon. Ja ĝi estas listigita kiel Monda Heredaĵo de Unesko.

Tre interesa festo estas “Naŭruzo”. Ĝi signifas “Nova tago”. Ĝi estas festo de printempo, paco kaj bono. Oni celebras ĝin la 21-an de marto. La popolo de Uzbekio tre ŝatas Naŭruzon. Ja la festo plenas je humanisma senco. Ĝi demonstras triumfon de vekiganta naturo, printempo kaj nova vivo. Malfacilas trovi feston, kiu tiom videble kaj ĝuste kombinas la harmonion de kulturo kaj naturo. Naŭruzo estas festo speciala. Ĝi aspiras al belo kaj konkordo. Bonvenigo de Naŭruzo ĉiam instigas homojn plibonigi la mondon, en kiu ni vivas. Ties vivodona energio ne nur inspiras kaj ĝojigas, sed ĉiufoje memorigas al ni pri la granda potenco de kreado; pri tio, ke ni ĉiuj estas infanoj de la planedo Tero. Nur de ni dependas, kia estos nia futuro. Ne hazarde Naŭruz-festo estas enskribita sur la Reprezentanta Listo de Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro. En 2010



la Internacia Naŭruz-Tago estis proklamita laŭ la decido de la Ĝenerala Asembleo de UN.

La leteroj venas al Samarkando diversaj. Por iuj partoprenantoj sufiĉas ununura saluta vorto. Aliaj skribas personan leteron al Samarkando. Iuj verkas saluton forme de poemo, kanto, desegnaĵo, foto. Okazas eĉ... – kuirartaj salutoj! Multaj komunikas siajn bondezirojn aŭ sonĝojn por la estonteco de la urbo...

Jen estas kelkaj citaĵoj el la leteroj [pro personaj datumoj ni indikas nur la landojn kaj urbojn – E.N.]:

*Gratulojn, Samarkando! Estas malfacile transdoni en nur kelkaj vortoj la mirindajn impresojn, kiujn mi havas depost mia mallonga tempo tie – tiom bonvenigaj homoj, nekredibla historio kaj komprenoble tiuj mens-konsternaj konstruaĵoj. Vere unika loko!* (Aŭstralio)

*Karaj amikoj en Samarkando, via lando estas simbolo de ekzotikeco kaj beleco en Italujo aŭ Britujo. Estas por mi granda plezuro saluti vin okaze de la venonta Naŭruzo en via belega urbo 2750-jara, koro de la Granda Silka Vojo, pri kies reviviĝo multaj esperas. Fakte la mondo bezonas multajn silkajn vojojn, por permesi interŝanĝojn, interkonatiĝojn kaj fine pacon. Saluton, Samarkando!*

(Londono, Britio/Italio)

*Saluton, karaj geamikoj! Ni gratulas vin en la nomo de Bulgara Esperanta-Asocio, okaze de la plej bela kaj ŝatata festo en via lando Uzbekio – la 21-a de marto... Akceptu niajn ardajn gratulojn kaj bondezirojn al vi kaj al viaj familianoj okaze de via festo. Estu sanaj, vivo- kaj amo-plenaj, feliĉaj, kaj bonhumoraj. Ĉiu popolo havas siajn historion, heroojn, vidindaĵojn, interesajn naturajn lokojn, legendojn, morojn, ktp. pri kiuj fieri. Ĉiu homo kredas je morgaŭa tago por pli bona vivo, sano, ĝojo, amo kaj feliĉo, kiujn oni deziras unu al alia dum tiu ĉi festo. Ekzistas latina saĝa frazo “dum mi spiras, mi esperas”. Homo esperas ĝis la*

*lasta bato de la koro. Do, tiu solena tago estu tago de novaj esperoj kaj atendoj en ĉiuj sferoj de la homa vivo. Fartu bone ne nur dum tiu ĉi tago, vivu por la momento, realigu viajn revojn kaj estu veraj homoj. Feliĉan Naŭruz-feston!*

(Bulgara Esperanto-Asocio)

*Ĉu 2019 alportos tiun necesan pacon al nia turmentita mondo? Ni nur povas esperi ke finfine la homoj iĝu pli saĝaj kaj ke ili ne plu perdu tempon en konfliktoj kaj militoj. Ĉu ni havos la ŝancon revidi vin ie dum la venonta jaro? Amike via,*

(Ostende, Belgio)

*Naŭruz-festo! Mirindaĵo de la planedo: dum la arboj floras kaj kreskas folioj en unu parto de la mondo, en la alia la naturo preparas sin por vintro. Sed ambaŭ estas bonaj kialoj por festi, revigligi senton de komunumo. Dancu, muziku laŭ la ritmo de la sezonoj!* (Melburno, Aŭstralio)

*Kio faras vian landon al ni aparte interesa estas la kvanto de tradiciaj kutimoj, kiuj persistis malgraŭ la*









*kara fora kaj proksima amiko, Samarkando!  
(Moskvo, Rusio)*

*Feliĉan Novjaron 2019! "Istanbulo Harmanfolk" deziras al vi Gajan Kristnaskon, Feliĉan Novjaron kaj la plej magiajn kaj famiĉplenajn feriojn! La Nova Jaro alportu al vi bonfarton kaj konfidon je la estonteco, la novajn kontaktojn kaj feliĉajn eventojn, feliĉon ĉiuhore kaj ĉiuminute, pliiĝante ĉiujn bonajn aferojn! Ni deziras, ke vi komencu la Novjaron kun pozitiva humoro kaj fido je viaj kapabloj! Ĉiuj viaj planoj plenumiĝu, aperu ĉe vi novaj ideoj! Ĉiuj viaj proksimaj kaj karaj homoj ĉiam estu subteno por vi. Lasu ĉiujn plej malbonajn aferojn malaperi en la pasinteco!  
(Istanbul, Turkio)*

Pri Internaciaj Letertagoj vaste raportas paperaj kaj retaj nacilingvaj periodaĵoj de Samarkando kaj Uzbekio ĝenerale. La plej interesaj leteroj estas publikigataj en diversaj lokaj revuoj kaj gazetoj.

La projekto Internaciaj Letertagoj havas interesan statistikon. De triono ĝis duono de la partoprenantoj nun estas Esperanto-parolantoj. Ĉiuj ceteraj estas neesperantistoj. Tamen ili ankaŭ legas kaj scias pri tiu Esperanto-klubo. Do, bona disvastigo de informo pri la internacia lingvo!

Post sukcesoj de Internaciaj Letertagoj samarkandaj samideanoj komencis organizi alian leter-ligitan aranĝon. Temas pri ampleksa internacia ekspozicio "Vojaĝo en la Fabelan Mondon de Novjaraj bildkartoj". Unue ĝi okazis fine

de decembro en 2017. Tiam la klubo de internacia amikeco "Esperanto" celebris sian 40-an jariĝon. La ekspozicio funkciis en la centra regiona biblioteko de Samarkando. Estis prezentitaj pli ol 1000 novjaraj kaj kristnaskaj bildkartoj el pli ol 60 landoj. La bildkartoj montris diversajn temojn, heroojn, historiojn pri Novjarfesto kaj Kristnasko: Avon Froston, Neĝulinon, Sanktan Nikolaon, amatajn heroojn de fabeloj, animaciaj filmoj. Kelkaj bildkartoj estis mane faritaj. Estis tiom da bildkartoj, ke multaj landoj havis proprajn standojn: Hungario, Pollando, Germanio, Francio, Anglio, Svedio, Usono, Nederlando, Ĉinio, Japanio, Suda Koreio kaj multaj aliaj.

Post tia sukceso samarkandaj esperantistoj planas daŭrigi ekspoziciojn. Ni gratulas niajn uzbekiajn samideanojn kaj deziras al ili pliajn sukcesojn!

Do, danke al Internaciaj Letertagoj vi povas dividi viajn travivaĵojn kaj sentojn, viziti novajn lokojn, konatiĝi kun unikaj kulturoj, taksi variajn tradiciojn kaj kutimojn kaj, certe, trovi novajn amikojn – ie ajn sur nia Terglobo.

La Internaciaj Letertagoj ne nur konatigas vastan internacian publikon kun uzbekiaj popolaj festoj kaj aliaj gravaj naciskalaj eventoj, sed samtempe diskonigas Esperanton kiel unikan kulturan fenomenon kaj efikan ponto-lingvon de internacia komunikado kaj kunlaboro.

**Do, karaj legantoj!** Se vi ŝatas konatiĝi kun la orienta fabelo, bonvenon! Skribu kaj amikiĝu! Kaj – pere de Esperanto – la fabelo alvenos al via domo kaj via vivo!

Jen estas la adreso (de orienta fabelo!): Anatolij Ionesov,  
Enciklopedia projekto "Samarkandiana",  
P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando,  
Uzbekio.

Interkultura mondo esprimas koran dankon al Anatolij Ionesov – la honora gvidanto de la samarkanda klubo de internacia amikeco "Esperanto" – pro la preparitaj materialoj!




# 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

## Intervjuo kun Povilas Jegrovas, prezidanto de Litova E-Asocio

**BET-55 okazos ĉi-somere en Litovio kaj dum ĝi oni festos kelkajn jubileojn.**

Baltiaj Esperanto-Tagoj havas tre riĉan historion. La komenco estis en 1959, post ioma varmigo de la reĝimo kaj restarigo de Esperanto-movado en Sovetunio. Tiam en baltiaj sovetaj respublikoj, Litovio, Latvio kaj Estonio, funkciis kant-festoj, dum kiuj venis la ideo organizi Baltiajn Esperanto-Tendarojn. Sovetiaj esperantistoj ne havis eblecon partopreni Universalajn Kongresojn kaj BET-oj estis ilia alternativo por baltiaj esperantistoj. En Sovetunio ne eblis fondi esperantistajn organizaĵojn. BET do fariĝis taŭga formo de baltia kunlaboro. La unua okazis en Latvio. Ĝin organizis Biruta Rozenfelde. Cetere ŝi partoprenis ankaŭ la jubilean BET-55 en Panevėžys. BET fariĝis ne nur baltia aranĝo. Venis ankaŭ esperantistoj el multaj lokoj de Sovetunio. BET do havis grandan signifon kaj donis fortan impulson por la tuta tutsoveta movado. La nuna BET jam ne estas nur baltia aranĝo. Ĝi fariĝis tuteŭropa esperantista aranĝo.

### Ni revenu al la ĉi-jara BET.

Ĝi estas jubilea, ĉar ĝi okazas en la jaro de 60-jariĝo de BET-oj. Ĝi okazas ankaŭ en la jaro de 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio. BET-55 okazos de la 6-a ĝis la 14-a de julio en la kvina plej granda urbo de Litovio Panevėžys, en la nordo de la lando. Ni atendas pli ol 300 partoprenantojn el trideko da landoj. BET-55 okazos en fakultato pri entreprenado kaj teknologioj de Kaŭna Teknologia Universitato. Kelkaj programeroj okazos ankaŭ en Urba Kulturcentro kaj aliaj urbaj areoj. Aktualaj informoj pri BET-55 estas legeblaj ĉi-sube 

– en la retejo de BET-55 – kaj ankaŭ en la novaĵretejo *La Balta Ondo*.

### Kia estos la programo de BET-55?

Ĝi konsistas el ses blokoj: la eduka, scienca, instrua, movada, kultura kaj ekskursiva. Okazos ankaŭ junularaj programeroj kaj prelegoj de famaj diverslandaj esperantistoj en tiel nomata somera universitato. Ekzemple ni aŭdos prelegojn sub la komuna titolo *Ĉu Esperanto plibonigas/plibonigos la mondon?* de la konata hungara esperantisto d-ro Gabor Markus. Prof.


Aloyzas Gudavičius prelegos pri la litovaj lingvo kaj kulturo. Tatjana Auderskaja el Ukrainio gvidos intelektajn ludojn. Francoise Noireau el Francio gvidos dancojn, muzikumos kaj instruos Esperanton. Okazos la 36-a sesio de San-Marineca Universitata Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj, gvidata de prof. Amri Wandel el Israelo.

Estos tre intensa instrua programo. Ni ĉiutage havos minimume kvin grupojn de Esperanto-kursoj de diversaj niveloj, ekde komencantoj ĝis la plej alta grado. Instruos mondfamaj Esperanto-instruistoj kiel Anne Jausions (Francio), Stano Marček (Slovakio), Svetlana Smetanina (Rusio), Gražina Opulskienė (Litovio) kaj Nina Pietuchowska (Pollando). Ĉiutage okazos koncertoj de diverslandaj esperantistaj muzikistoj kaj kantistoj, ekzemple ni aŭdos la ensemblon el Rusio “Ekvinokso”, la litovan ensemblon “Asorti”, la konatan kantiston Mikaelo Bronštejn el Rusio, la profesion korean kantistinon Amira Chun, la muzikiston kaj kantiston Kaŝi el Germanio. Okazos ankaŭ tuttaga ekskurso al la najbaraj urboj Biržai kaj Pakruojis kaj duontagaj ekskursoj tra la urbo Panevėžys kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.



# Verba krucenigmo

La rubrikon  
prizorgas:  
Stefan MacGill



Jen enigmeto, kiu rilatas al la teksto de la posta artikolo.

R = uzu nur la radikon, do sen finaĵo. **Vertikale ↓**

|    |    |   |   |   |
|----|----|---|---|---|
| 1  | 2  | 3 | 4 | 5 |
| 6  |    |   |   |   |
| 7  |    |   |   |   |
|    |    | 8 |   |   |
| 9  | 10 |   |   |   |
| 11 |    |   |   |   |

1. Trovas sin en difinita loko. 'Dakaro \_\_\_\_\_ apud la maro en Senegal.' (5)
2. Internacia Rajtigita Ekzamenantaro – parto de la ekzamena sistemo de UEA/ILEI. (mallongigo 3)
3. Tio, kion oni diras, kiam iu donas al vi ion aŭ helpas al vi. (6)
4. Ricevilo de signaloj por tradicia televidilo aŭ radio.
5. Restas en loko sur la piedoj, manke de seĝo aŭ lito. (6)
10. Kun ZO fundamento, kun NO purigejo, kun RO obstaklo. (2)

## Horizontale →

1. Okupas lokon sur seĝo (5)
6. Iu, kiu movas sin de proksimo al malpli proksima loko (R – 5)
7. Alloga.
8. Komisiono por Eksteraj Rilatoj – multjara laboro de TEJO (mallongigo 3)
9. La mono, kiun oni pagas por regule ricevi revuon aŭ servon (5).
11. Estos en bona mensa kaj fizika stato. (5)

**Speciala premio:** kiu povas rigardi nian titolon kaj trovi du signifojn por la vorto 'Enigmeto'? Uzu viajn analizajn kapablojn!

|   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| T | U | T | M | O | N | D | I | G | O |
| E |   | A | I | S |   | E | R | A | R |
| J | E | S |   | T | O | N |   | S | G |
| O | N | K | L | O |   | S | A | T | A |
|   | K | O |   | J |   | I | N | O | N |
| R | E | J | U | N | I | G | O |   | I |
| E | T | N | E |   | D | O | N |   | Z |
| N | O |   | A | V | A | N | C | I |   |

## Solvo de la enigmo

el la antaŭa numero →



Stefan MacGill:

# Terapio bezonata!

*Ho, ve, mia dorso doloras!*

**Sekvas rakonto kun kelkaj mankantaj vortoj. Vi povos aldoni la vortojn, se vi solvis la krucenigmon! Restos nur du solvoj, kiuj ne troveblas en la rakonto – entute ili havas kvin literojn.**

**K**iom da vortoj el Esperanto estas fareblaj el tiuj kvin literoj? Devas esti trovebla naŭ vortoj (rajtas esti kombinitaj vortoj kaj rajtas esti sen finaĵoj). Se vi trovos dekan, sendu tion por ricevi premion! Solvoj en la sekva numero!

Mi \_\_\_\_\_1 → \_\_\_\_\_ antaŭ mia komputilo. Ho, ve, mia dorso doloras.

“Ho, ve, mia dorso doloras” mi diras al mi mem. Ve, komputiloj estas danĝeraj estaĵoj. Ĝi legas miajn lip-movojn. Per nevidebla \_\_\_\_\_4 ↓ \_\_\_\_\_ ĝi komunikas mian penson al la centra servilo. Ene de duona sekundo aperas reklamo sur la ekrano:

### Dors-doloro?

Jen la solvo! Iru al terapio! \_\_\_\_\_9 → \_\_\_\_\_ por la tuta kurso – duonpreze!

Anoncu vin tuj: Magi Strato 12.

“Tio estas \_\_\_\_\_7 → \_\_\_\_\_ propono!” Mi diras al mi mem.

“Certe, iru tuj” respondas la komputilo.

“Damnindaj lip-mov-legaj programoj!” mi pensas.

“Ne kulpigu min,” respondas la komputilo. “Kulpigu la programistojn!”

Por eviti eternan dialogadon kun komputilo/programistoj, mi tuj ekas.

===0000000000===

Nun mi estas \_\_\_\_\_6 → \_\_\_\_\_a al la adreso kiu aperis sube en la reklamo. Ĝi

\_\_\_\_\_1 ↓ \_\_\_\_\_ en la urbo-centro apud la kortumoj.

Antaŭ mi, mi vidas la oficejon. “Mi espereble ne \_\_\_\_\_5 ↓ \_\_\_\_\_ longe en la vico.” Mi pensas. Mi rifuzas posedi saĝ-telefonon, do mi kuraĝas pensi surstrate.

Mi eniras la oficejon, kaj ekpensas: “Espereble mi ne...” Diable, mi forgesis, ke la oficejo estas komplete komputiligita, kune kun tekst-antaŭvidaj programoj. Ĝi per kompleksaj algoritmoj kompletigis mian penson kaj tuj vidigis sur siaj ekranoj mesaĝon:

“Ne, vi ne longe atendos en la vico – nia Artefarita Inteligento garantias tion.”

Efektive, mi ricevis baldaŭ la servon, pagis por la terapio kaj diris “\_\_\_\_\_3 ↓ \_\_\_\_\_

Re-\_\_\_\_\_2 ↓ \_\_\_\_\_ al la hejmo mi pensis al mi mem: “Ho, kie estas la terapio kontraŭ nedezirataj reklamoj?”

## Vortklarigoj

*Terapio:* kuracado per konsiloj kaj ekzercoj

*Eterna:* senfina

*Estaĵo:* aĵo, kiu ekzistas

*Reklamo:* komuniko, kiu provas komuniki vin aĉeti ion, kion vi ne bezonas

*Damnindaj:* malbenataj, malvolataj, diablaj

*Vico:* linio de homoj por aĉeti ion aŭ ricevo de servoj

*Artefarita Inteligento (AI):* La malo de Natura Stulteco (NS)

*Saĝ-telefono:* Telefono, kiu aŭdacas opinii sin pli saĝa ol ĝia posedanto

*Algoritmo:* matematika formulo, kiu permesas al komputilo opinii sin pli saĝa ol ĝia posedanto

*Ekrano:* la vidiga parto de komputilo, kies esenca funkcio estas trude vidigi nedezirantajn reklamojn.

*Garantias:* certigas





KIE aboneblas *Juna Amiko*?

## Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

**Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au). **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at). **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2000 Antwerpen; [financoj@fel.esperanto.be](mailto:financoj@fel.esperanto.be). **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; [belabutiko@esperanto.org.br](mailto:belabutiko@esperanto.org.br). **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk). **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; [mrvp@interpres.org](mailto:mrvp@interpres.org); [ilei@espereto.com](mailto:ilei@espereto.com). **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz); [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz). **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; [strigo@esperanto.cl](mailto:strigo@esperanto.cl). **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; [arko.gong@qq.com](mailto:arko.gong@qq.com). **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; [arnecasper@yahoo.com](mailto:arnecasper@yahoo.com). **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee). **Finnlando:** Sylvia Hämäläinen, P.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi). **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; [esperanto-france@esperanto.org.net](mailto:esperanto-france@esperanto.org.net). **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; [wolfgang.schwanzer@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzer@esperanto.de). **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de). **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thököly út 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; [hungario@gmail.com](mailto:hungario@gmail.com), [www.esperantohea.hu](http://www.esperantohea.hu). HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; [simio\\_2004@yahoo.es](mailto:simio_2004@yahoo.es). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skoloraðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; [esperanto@isl.is](mailto:esperanto@isl.is). **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; [saviogp@netvision.net.il](mailto:saviogp@netvision.net.il); [esperantisto@live.com](mailto:esperantisto@live.com). **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; [silkovojo@aliceposta.it](mailto:silkovojo@aliceposta.it). **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp). **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; [marija@hes-keu.hr](mailto:marija@hes-keu.hr). **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; [irenaa@takas.lt](mailto:irenaa@takas.lt). **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne; [akbondhus@jkn.no](mailto:akbondhus@jkn.no). **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz). **Pakistano:** Jawaid Ehsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tataara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 KRAKÓW; [mtatara@gmail.com](mailto:mtatara@gmail.com). **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/C A, PT-1500 Lisboa; [asocio@esperanto.pt](mailto:asocio@esperanto.pt). **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; [sezonoj@mail.ru](mailto:sezonoj@mail.ru). **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; [zciric2@gmail.com](mailto:zciric2@gmail.com). **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net). **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevågen 40 B Igh 1303, SE-931 38 Skellefteå; [leif.holmlund@telia.com](mailto:leif.holmlund@telia.com). **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch). **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; [rezamenhof@yahoo.com](mailto:rezamenhof@yahoo.com). **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; [esp.togo@cafe.tg](mailto:esp.togo@cafe.tg). **Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608; [eusa@esperanto-usa.org](mailto:eusa@esperanto-usa.org). **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; [uea@uea.org](mailto:uea@uea.org). **Mendojn eblas sendi ankaŭ al [ilei.officejo@gmail.com](mailto:ilei.officejo@gmail.com).**



# Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

## LA SEPA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ

okazos

en **VROCLAVO** (pole Wrocław)  
en la prestiĝa loko STARA FILHARMONIA  
la **25-26an de majo 2019**



La festivalo okazas **ĉiujare en majo** en du kategorioj:

1. koruso aŭ ensemblo,
2. solisto.

**Aĝo de la partoprenantoj:** de 6 ĝis .... jaroj.

Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estas nur Esperantaj kantoj.



### PRIJUĜAS INTERNACIA ĴURIO

La 25an de majo – Konkursa provaŭdo de partoprenantoj

La 26an de majo – Koncerto de Premiitoj

Europejskie  
Centrum  
Edukacji  
Międzykulturowej



### HONORA PATRONECO

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

EUROKKA

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

MILA VAN DER HORST KOLIŃSKA

AMASKOMUNIKILA PATRONECO

“JUNA AMIKO”

Sendu vian aliĝilon **ĝis la fino de la aprilo 2019** al la organizanto  
**LA EŬROPA CENTRO DE INTERKULTURA EDUKADO**



Informoj riceveblas ĉe: [festivalo.eo@gmail.com](mailto:festivalo.eo@gmail.com), skribante en la temo de la mesaĝo:  
E-kanto, aŭ telefone +48 692 551 131, +48 512 456 449, [www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl)



# SUPERNATURA LERNEJO

